

# LA SINO HISPANA \*



S-ro SERAFENO BAUDIN AGÜERO  
Sekretario de la Grupo Esperantista, esperanta konsulo  
de La Guardia (Jaén)  
kaj Sekretario de Internacia Societo Pedagogia

**ENHAVO:** La tria Kongreso. — Mortantaj steloj. — Avizo. — Floroj. — Sciigoj. — Bibliografio. — Korespondada fako. — Niaj frataj vizitantoj. — Novaj anoj de H. S. — Anoncoj.

## La tria Kongreso <sup>1</sup>

«La Trio por La Tria» nun petas, ke la Esperantistoj, kiuj venos al la Kongreso, bonvole sendos kiel eble plej baldaŭ la enmetitan aliĝilon <sup>2</sup> kun sciigoj pri siaj bezonoj dum la semajno kongresa.

Tiujn sciigojn oni devas sendi al *Triano H. B. Mudie, Kongreso, 2, King's Parade, Cambridge, England.*

Precizaj respondoj al la demandoj tie presitaj, faciligos organizadon laŭ la societema vidpunkto kaj, se iu Kongresano deziras havi loĝejon apud speciala amiko, li povos tion sciigi kaj ni celos kontentigi lin.

Fruaj respondintoj povos loĝi en do-

## El tercer Congreso <sup>1</sup>

«El Terceto para el Tercero» pide ahora, que los esperantistas que vayan al Congreso tengan la bondad de enviar lo más pronto posible la unida adhesión <sup>2</sup> con noticias respecto á sus necesidades durante la semana del Congreso.

Esas noticias deben ser enviadas al *miembro del tercero, H. B. Mudie, Congreso, 2, King's Parade, Cambridge, England.*

Respuestas concretas á las preguntas allí impresas, facilitarán la organización bajo el punto de vista de interés por la asociación, y si algún congresista desea tener alojamiento cerca de determinado amigo, que nos lo notifique y procuraremos complacerle.

Los que contesten pronto podrán alo-

<sup>1</sup> El «The British Esperantist».

<sup>2</sup> Aliĝilojn ni ne havas. Oni ilin petu al S-ro Mudie.

<sup>1</sup> De «The British Esperantist».

<sup>2</sup> No tenemus adhesiones, pidanse al Sr. Mudie.

moj proksime de la urbomezo—kie okazos niaj festoj kaj kunvenoj. Posteuloj sendube devos esti loĝataj iom pli malproksime se, kiel ni jam estas preskaŭ certaj, la nombro de la Kongresanoj estos tre granda.

Ni jam zorgas pri la preparado de la Kongresa Libro kaj aranĝis, ke la kosto de la anoncoj en ĝi estos: Por unu plena paĝo, 30 fr.; por  $\frac{1}{2}$  paĝo, 16 fr.; por  $\frac{1}{4}$  paĝo, 9 fr.; kaj tiuj, kiuj deziras fari anoncojn estas petataj skribi antaŭ la 15<sup>a</sup> de Junio al la Trio.

Tiuj, kiuj deziras ekspozicii ian specialaĵon, devas sendi detalojn antaŭ Junio 15, kaj ekspedi la elmontrotaĵojn antaŭ Junio 30—krom pereemaĵoj.

Laŭ la anonco farita lastan monaton <sup>1</sup> *Triano* Mudie konsentis prezidi la Londonajn post-kongresajn aranĝojn. Li fondis diversajn komitatojn por klopodi pri «Loĝado kaj Gastado», «Dimanĉo mateno kaj posttagmezo», «Muzeo kaj Vidindaĵoj», «Fervojaj Ekskursoj» kaj «Vespera Koncerto». Esperantistoj do povos esti certaj, ke iliaj Londonaj samideanoj celos konduki ilin en la plej interesajn lokojn inter Aŭgusto 17 kaj 27.

La ĝenerala plano ĝis nun aranĝita estas:

*Dimanĉo, Aŭgusto 18.*—Diversaj preĝejoj, Botanikaj kaj Zoologiaj Ĝardenoj, k. t. p.

*Lundo kaj Mardo.*—Kondukataj vizitoj kaj veturoj al muzeoj, pentraĵaroj, k. t. p.

*Lundo Vespere.*—Koncerto kaj teatra ludo, por helpi Londonan propagandon.

*Merkredo, Aŭgusto 21, ĝis Mardo, Aŭgusto 27.*—Kelktagaj ekskursoj en diversajn interesajn regionojn de Anglujo. Ili daŭros ĝis la elĉerpiĝo de la rabatoj fervojaj.

jarse en sitios próximos al centro de la población—donde tendrán lugar nuestras fiestas y reuniones. Los retrasados indudablemente deberán ser alojados algo más lejos si, como ya estamos casi ciertos, el número de congresistas es muy grande.

Ya nos ocupamos de la preparación del Libro del Congreso y hemos concertado que el precio de los anuncios en él sea: Por una página completa, 30 fr.; por  $\frac{1}{2}$  página, 16 fr.; por  $\frac{1}{4}$  de página, 9 fr.; y á los que quieran hacer anuncios se les suplica que escriban antes del 15 de Junio al Tercero.

Los que deseen exponer algunas especialidades deben enviar detalles antes del 15 de Junio y expedir las muestras antes del 30 del mismo con excepción de los efectos frágiles.

Según el anuncio <sup>1</sup> del mes pasado, el miembro del Terceto Mudie está conforme en presidir los preparativos en Londres posteriores al Congreso. Ha fundado varios comités para procurar «Alojamiento y hospedaje», «Domingo por la mañana y al medio día», «Museos y cosas dignas de verse», «Excursiones en ferrocarriles» y «Concierto nocturno». Los esperantistas pueden, pues, estar ciertos de que sus samideanos de Londres se cuidarán de conducirlos á los sitios más interesantes del 17 al 27 de Agosto.

El plan general hasta ahora combinado es:

*Domingo, Agosto 18.*—Diversas iglesias, jardines botánicos y zoológicos, etc.

*Lunes y martes.*—Visitas y expediciones á museos, colecciones de pinturas, etc.

*Lunes por la noche.*—Concierto y representación en teatro para ayudar la propaganda de Londres.

*Miércoles 21, hasta el martes 27 de Agosto.*—Excursiones algunos días á diversas regiones interesantes de Inglaterra. Durarán hasta el vencimiento de las rebajas de ferrocarriles.

<sup>1</sup> La lastan anoncon de nia Maja numero.

<sup>1</sup> El último anuncio de nuestro número de Mayo.

La detalojn de ĉi tiuj ekskursoj ni poste donos al tiuj, kiuj sendis enmetitan aliĝilon.

Tiuj, kiuj frue respondos, faros grandan servon.

LA TRIG.

Los detalles de estas excursiones los daremos con posterioridad, á los que nos hayan mandado adhesión.

Los que contesten pronto nos harán un gran servicio.

EL TERCETO.

## Mortantaj steloj

*Al la fervora esperantisto S-ro Bartolomeo Font.*

Car la branĉaro florplenega  
la trido ĉesis melodia...

Noktiĝas. Ter' melankolia  
dormiĝas en svenet' dolĉega.

L'etero blua mallumiĝas  
jam per nuancoj palaj—puraj  
kaj trans vaporoj ruĝpurpuraj  
l'astrestro brila ekkaŝiĝas.

Palma de Mallorca, Marto 1907.

Radio lasta de l'mortanta  
Sun' kiu jam malsupreniras  
timeme ĉambron gliteniras  
de bel fraŭlin' agonianta.

Kaj la radio de orhelo  
mortiĝis ĉe la estingita  
rigardo lasta, elĵetita  
de tiu ĉi alia stelo.

JOSEFO ROSSELLÓ ORDINAS.

## AVIZO

La ampleksoj de nia gazeto ne pemezas sur ĝi enpresi longajn cirkulerojn kiujn ni ofte ricevas. Tial ni publikigos ilin ekstrakte, sed se la sendantoj havas intereson pri ilia plena konigecco ili sendu al ni kvincenton da ili kaj ni ilin dissendos intermetitajn en nia gazeto.

## Floroj

*(Laŭ la glora inĝeniero kaj dramaŭtoro  
F. Eĉegaraj.)*

Dum la unuaj epokoj geologiaj ne ekzistis floroj, almenaŭ tiaj kiaj ni tiel nomas, tiuj de graciaj formoj kaj brilaj koloroj.

La kreskaĵa regno estis nemezurebla tavolo, verda kiel la herbo, la musko, la likeno, la filiko.

La vegetaĵoj havis siajn amojn, sed se ni povus tiel diri, amojn sendifinajn, kaŝitajn sub la nuanco ĉiam sama de la klorofilo. Tie estas la deveno de kriptogamoj.

## Las flores

*(Según el famoso ingeniero y dramaturgo  
F. Echeagaray.)*

En las primeras edades geológicas las flores no existían. Al menos las que nosotros conocemos, las de graciosas formas y brillantes colores.

El mundo vegetal era una inmensa capa de verdura. Algo así como la hierba, como el musgo, como el líquen, como el helecho.

Las plantas tenían sus amores; pero, por decirlo así, difusos, ocultos bajo el matiz uniforme de la clorofila. De ahí vienen las criptógamas.

Ili estis por tiel diri, fermitaj kaj misteraj haremoj.

Kiel, en tiu sendiferenca verdaĵo produktigis la floroj, kun la brilaj nuancoj de l' ĉielarko, tion povas klarigi la nova scienco, per la grava teorio de la evolucio, sed la legendo kaj la poezio, ankaŭ klarigas ĝin, laŭ siaj procedoj.

La legendo, kiun mi tuj diras aŭ kiun mi tuj elpensos, devas esti la plej kredinda, kaj kiu plej kontentige klarigas la devenon de la floroj.

Mi ekkomencos la legendon.

Kiam Dio kreis nian akvoteran globon, en la ĉielo estis granda sciemo por diveni tion, kio estos tiu faritaĵo de la grandega Povo.

Kaj dum la fortika krusto krakegadis per naskaj konvulsioj, kaj la maroj fluegis tien kaj ĉien per mallertaj kaj bestaj movadoj, kvazaŭ monstro ĵus naskita, kaj dum la nuboj kunamasiĝis en la ĉielon, kaj la suno penis elŝiri ilin por penetrigi siajn varmegajn radiojn en la densajn verdajn arbarojn kaj en la vastajn marĉojn, kiuj sub la branĉaroj kuŝis, la anĝeloj montris siajn kapojn tra la fenestroj de la ĉielo, por sciavide rigardi en montoj kaj valoj la teron naskiĝantan.

Alvenis la tago kiam la unua viro aperis, kaj la anĝela sciemo ankaŭ kreskis.

Kia estas la nova estaĵo? demandis sin reciproke anĝeloj kaj keruboj.

Kaj por kontentigi sian scivolemon la anĝeletoj malsupreniris de la ĉielo, kaj staris sur nubegoj, eltirante siajn kolojn super la bordoj de vastegaj vaporaj amasoj.

Kaj ili vidis viron, kaj ni devas konfesi, ke Adamo tute ne plaĉis al ili.

Li ŝajnis gracia, lia frunto estis nobla, bruliganta lia rigardo, lia kapharo brila kaj ringigita pro la paradizaj ventetoj, kaj lia movmaniero agrabla.

Tamen la anĝeloj tuj suspektis, ke tiu ĉi bela estaĵo kaŭzos al ili multajn malplezurojn.

Ili divenis, mi nescias kial, ke la viro

Eran, por deciro alí, harenes cerra-dos y misteriosos.

Cómo, de aquel verde uniforme han brotado las flores, con los matices brillantes del arco iris, podrá explicarlo la ciencia moderna por la gran teoría de la evolución. Pero la leyenda y la poesía también lo explican á su modo.

La leyenda que voy á referir, ó que voy á inventar, debe ser la más acreditada, y es una explicación muy satisfactoria del nacimiento de las flores.

Empecemos, pues, la leyenda.

Cuando Dios forjó nuestro globo terráqueo hubo gran curiosidad en el cielo por adivinar lo que podría ser aquella obra del Poder infinito.

Y mientras la costra sólida cruzía en convulsiones de alumbramiento, y los mares iban de acá para allá con movimientos torpes y brutales de monstruo que acaba de nacer, y las nubes se amontonaban en el cielo, y el sol pugnaba por romperlas para venir á clavar sus ardientes rayos en los espesos bosques de verdura y en los inmensos pantanos que bajo la fronda se extendían, los ángeles asomaban sus cabezas por las ventanitas del cielo, para curiosear por montes y valles de la naciente tierra.

Llegó un día en que apareció el primer hombre, y la curiosidad angelical creció de punto.

—¿Qué será el nuevo ser?—se preguntaban ángeles y querubines.

Y para satisfacer su curiosidad bajaron del cielo, y se posesionaron en unos y otros nubarrones estirando los cuellos por los bordes de las inmensas y vaporosas masas.

Y vieron al hombre; y hay que confesar que el Adán primitivo no les satisfizo por completo.

Parecía gallardo; su frente era noble; su mirada ardiente; sus ademanes dominadores, su melena—que ensortijaban las brisas del paraíso—espléndida y flotante.

Y sin embargo, los ángeles sospecharon desde el primer momento que aquel sér tan hermoso había de darles muchos disgustos.

Adivinaban—no sé por qué—que el

estos grava estaĵo, sed danĝera, la mal-lerta observanto nur estus admirinta la dian skulptaĵon, sed la anĝeloj, la keruboj, kaj la serafoj divenis en tiu bela korpo kaj sub tiu nobla kranio, ĝermojn de malbonaj pasioj.

*Tradukis R. CODORNIU.*

*(Daŭrigota.)*

hombre era un ser grande, pero un ser peligroso. Un mal observador se hubiera contentado con admirar la divina escultura paradisiaca: pero los ángeles, los querubines y algún serafín que otro, adivinaban bajo aquel noble cráneo gérmenes de pasiones funestas.

*(Continuará.)*

## Sciigoj

**Alĝerio.**—La Alĝer'a Grupo intencas krei senpagan monatan gazeton propagandan, sub la titolo «Afrika Esperantisto».

Ĉiuj samideanoj estas petataj sciigi al ĝi (4, rue du Marché, Alger), pri nomoj, adresoj, k. t. p. de esperantistoj loĝantaj en Afriko, precipe pri Alĝerujo, Maroklando, Tunisujo, Egiptujo, Madagaskarlando, Transvalo, Sud-Afriko, Gvineo, Kongolando, k. c.

Oni ankaŭ intencas prokuri la alprenon de Esperanto por la Alĝera Komercoco, ĉar tio faciligos la komercajn aferojn kiujn hodiaŭ multe malhelpas la diversajn lingvojn ke oni parolas en tiu lando. Sin okupas speciale pri tio per energia propagando, la tiea gazeto «Journal General» organo de la Alĝeria Komercoco.

**Anglujo.**—Novan grupon ni havas en Hilmacolm.

La «Trio por la Tria» jam ricevis pli ol 800 aliĝecojn por la Kambridge'a Kongreso. La registro kiel societano kostas 10 frankojn. La veturado de Parizo ĝis Londono 73, 47 kaj 37 frankojn laŭ klaso kaj de Londono al Kambridge'o 50 % da rabato sur la kutimataj prezoj. Loĝado kaj manĝado dum la tagaro, de 45 frankojn je plu. Sin turnu al S.<sup>ro</sup> Mudie Kongreso, 2, kings Parade, Kambridge.

**Belgujo.**—

† La respektinda S.<sup>ro</sup> Champi, ingeniero, doktoro de sciencoj unu el la pli malnovaj kaj entuziasmaj propagandistoj de Esperanto, ĵus mortis. Ni sendas al

## Noticias

**Argelia.**—El grupo de Argel intenta crear una revista gratuita mensual de progaganda, bajo el título de «Afrika Esperantisto».

Se suplica á todos los colegas le manifiesten (4, rue du Marché, Alger), nombres, direcciones, etc., de esperantistas que habiten en Africa, principalmente en Argelia, Marruecos, Túnez, Egipto, Madagascar, Transvaal, Africa del Sur, Guinea, Congo, etc.

También se intenta procurar la adopción del Esperanto por el comercio de Argel, porque ello facilitaría los negocios, á los cuales hoy entorpecen mucho los diversos idiomas que se hablan en aquel país. Se ocupa especialmente de ello el periódico local «Journal General», órgano del comercio argelino.

**Inglaterra.**—Un nuevo grupo tenemos en Hilmacolm.

El «Terceto para el Tercero» ha recibido ya más de 800 adhesiones para el Congreso de Cambridge. La inscripción como socio cuesta 10 francos. El viaje de París á Londres 73, 47 y 37 francos, según clase, y de Londres á Cambridge 50 % de rebaja sobre los precios de costumbre. Alojamiento y manutención durante los días de estancia, de 45 fr. en adelante. Diríjense al Sr. Mudie, Congreso, 2, kings Parade, Cambridge.

**Bélgica.**—

† El respetable Sr. A. Champi, ingeniero, doctor en ciencias, uno de los más antiguos y entusiastas propagandistas de Esperanto, acaba de fallecer. Enviamos á

lia filo, la nelacebla sekretario de Anverpena Grupo kaj al lia tuta familio, la esprimon de nia bedaŭro.

Grupoj fondiĝis en Antoing kaj en la Katolika lernejo de Saind-Frond.

**Bohemujo.**—«Unua virino grupo de l'Esperanto klubo en Praha» fondis du kursojn de Esperanto, kiuj estas klarigitaj de S.<sup>ino</sup> Matilde Kraŭsova kaj fraŭlino Ludmilo Tesarova. Tiuj *grupinoj* estas al ni tre simpatiaj kaj ni deziras ilian disvastigon, ĉar ĉie la bela sekso trudkondukas al la homaro, kaj kiam virino diras «jetu vin tra la balkono», oni ne devas diskuti, sed metu matracon ĉe la lokfalon.

La bohemaj esperantistoj okaze festoj kiuj de la 28<sup>a</sup> Junio al la 1.<sup>a</sup> Julio oni solenigos en Praha, aranĝas specialan kunvenon de esperantistoj kaj ĝentile invitas ĉien iri al ĉiuj samideanoj.

**Brazilo.**—De la 12<sup>a</sup> al la 21<sup>a</sup> tagoj de la proksima Julia monato, okazos en Rio de Janeiro esperantistan kongreson kies celo estas sistematigi la propagandon kaj lernadon de nia amata lingvo. Oni intencas ankaŭ organizi malgrandan ekspozicion kaj estas petataj ĉiuj samideanoj, sendi ĉiuspecajn dokumentojn taŭgante l'aferon al S.<sup>ro</sup> Commissao do «Congresso Brasileiro de Esperanto», rua dos Ourives, 85, 1.<sup>o</sup> condar, Rio de Janeiro, Brasil.

**Bulgarujo.**—Novan, simpatian, kuraĝan kunulon, ni tie havas. «Bulgara Esperantisto» naskas alportante al ni bonegajn sciigojn. Ĝi informas nin pri la kreskado de Esperanto en ĝia lando kaj pri la ŝanĝo favora al ni, kiun faris la Bulgara gazetaro. Ĝia programo estas de lerta propagandisto. Bonvenita estu nia kara kolego.

Lia Reĝa Moŝto Ferdinando 1.<sup>a</sup> permesas al la bulgaraj militistoj porti esperantistan signon sur iliaj uniformoj.

**Danujo.**—Oni fondis tie esperantistan Societon kaj gazeton kies nomo estas «Helpa Lingvo».

su hijo, el incansable secretario del grupo de Amberes y á toda su familia, la expresión de nuestro sentimiento.

Se han fundado grupos en Antoing y en la Escuela católica de Saind-Frond.

**Bohemia.**—El primer grupo femenino del «Club esperantista de Praha» ha fundado dos cursos de Esperanto que serán explicados por la Sra. Matilde Krausova y la Srta. Ludmila Tesarova. Esos *grupos femeninos* nos son muy simpáticos y deseamos su difusión, porque en todas partes el bello sexo arrastra á la humanidad, y cuando una mujer dice «tírate por el balcón», no debe discutirse, sino poner un colchón en el sitio en que se ha de caer.

Los esperantistas bohemios, con motivo de las fiestas que del 28 de Junio al 1.<sup>o</sup> de Julio tendrán lugar en Praha, preparan una reunión especial de esperantistas y cortésmente invitan á ir allí á todos los colegas.

**Brasil.**—Del 12 al 21 del próximo mes de Julio, tendrá lugar en Río de Janeiro un Congreso esperantista cuyo fin es sistematizar la propaganda y enseñanza de nuestra amada lengua. Se intenta también organizar una pequeña exposición y se pide á todos los samideanos que envíen toda clase de documentos útiles al asunto al Sr. Comisario del Congreso brasileño de Esperanto, calle de Ourives, 85, 1.<sup>a</sup> andar, Rio de Janeiro, Brasil.

**Bulgaria.**—Un nuevo, simpático, valeroso compañero, tenemos allí. «Bulgara Esperantisto» nace trayéndonos buenísimas noticias. Nos informa del aumento del Esperanto en su país y del cambio favorable á nosotros que ha hecho l prensa búlgara. Su programa es de un hábil propagandista. Bienvenido sea nuestro querido colega.

S. M. el rey Fernando I permite á los militares búlgaros llevar el signo de Esperanto sobre sus uniformes.

**Dinamarca.**—Se ha fundado allí una Sociedad Esperantista y un periódico cuyo nombre es «Helpa Lingvo».

Niajn fratajn salutojn.

### Francujo.—

† Sinjoro komandanto Razouls, honora prezidanto de la Grupo de Toulouse, unu el la unuaj kaj bonaj propagandistaj de Esperanto, mortis. Nia kondolenco al lia familio.

Jen la proponon prezentita de S.<sup>ro</sup> Lucien Cornet, deputato de la Jone'o, al la Franca Kongreso, subskribita de 69 deputatoj kaj hodiaŭ estante en la lernada komisio.

«La lernado de la lingvo internacia Esperanto estas entenita en la programoj de la publika lernado kiu enhavas la instrudon de vivaj lingvoj.

Tiu ĉi lernado estos laŭvole, kaj la lernantoj kiuj prezentos al diversaj konkursoj la anglan, germanan, italan, hispanan aŭ araban lingvojn, povas aldoni al tiuj lingvoj la lingvon Esperanton.

Ili havos la utilojn deciditajn por la kandidatoj petantaj esti demanditaj pri aldonata lingvo.»

En Avignon fondiĝis esperantista fako ĉe la «Association Amicale des Anciens Elèves de l'École de la rue des Ortolans.»

En Lille, S.<sup>ro</sup> Minet, inspektoro de la unua grada instruado decidis ke de la venonta jaro la instruado de Esperanto estos deviga en la superaj klasoj de la unuagradaj Kongresoj.

«Centra Oficejo» aranĝas grandan katalogon de ĉiuj la eldonitaj esperantaj libroj.

Fondiĝis en Parizo societo titolita «Tutmonda Labora Societo», kies celo estas disvastigi esperanton inter la gedungistoj. —Unuigi amike la esperantistajn geoficistojn kaj gelaboristojn. —Havigi laboron al la senlaboraj anoj. —Sciigas pri tio sinjoro P. Blaise, sekretario de la Asocio, 4, rue Bourg, Tibourg, Parizo.

Estas fondita «Marista Esperantista Ligo», kies celo estas: 1.<sup>o</sup> Disvastigi uzon

Nuestros fraternales saludos.

### Francia.—

† El señor comandante Razouls, presidente honorario del Grupo de Tolosa, uno de los primeros y buenos propagandistas del Esperanto, ha fallecido. Nuestro pésame á su familia.

He aquí la proposición presentada por el Sr. Luciano Cornet, diputado de la Jone, al Congreso francés, firmada por 69 diputados y hoy en la comisión de estudio.

«La enseñanza de la lengua internacional Esperanto se contiene en los programas de la enseñanza pública que comprende el aprendizaje de las lenguas vivas.

Este estudio es voluntario, y los discípulos que se presenten á los varios concursos de inglés, alemán, italiano, español ó árabe, pueden añadir á esas lenguas el Esperanto.

Gozarán de los beneficios otorgados á los candidatos que solicitan ser examinados de una lengua suplementaria.»

En Avignon se ha fundado una sección esperantista en la «Asociación amistosa de los Antiguos discípulos de la Escuela de la calle de Ortolans.»

En Lille, el Sr. Minet, inspector de la enseñanza de primer grado, ha dispuesto que el próximo año la instrucción del Esperanto sea obligatoria en las clases superiores de los congresos de primer grado.

«Centra Oficejo» prepara un catálogo de todos los libros editados en Esperanto.

Se ha fundado en París una sociedad titulada «Tutmonda Labora Societo» (Sociedad Universal del Trabajo), cuyo fin es divulgar el Esperanto entre los jornaleros de ambos sexos. —Unir amistosamente á los esperantistas de ambos sexos artesanos y trabajadores. —Procurar trabajo á los socios que no lo tengan. Informa de ello el Sr. P. Blaise, secretario de la Asociación, 4, rue Bourg, Tibourg, París.

Se ha fundado una «Liga Marítima Esperantista», cuyo propósito es, 1.<sup>o</sup> Di-

de Esperanto en la maristaro.—2.<sup>o</sup> Iniciati aŭ helpi kian ajn organizacion, kies celo doni al la marveturantoj, ĉe la havenoj, la profitojn elvenontajn el la uzo de Esperanto.

Por informoj pri tiu afero, utiliga al la maristoj kaj al la marveturantoj, sin adresu al S.<sup>ro</sup> René Mesny, profesoro de marveturarto, Granville (Manche).

Nia kara amiko leŭtenanto Bayol kaj lia edzino, faris ekspedon tra kelkaj urboj germanaj kaj bohemiaj estinte ĉie frate ricevitaj de la samideanoj. Ili profite klopodis dum ilia veturado pro nia kara lingvo kaj ĝia frateco kun Ruĝa Kruco.

«Les Annales Diplomatiques & Consulaires» publikigadas serion da verme-gaj artikoloj pri Esperanto, de S.<sup>ro</sup> Tassencourt, prezidanto de la Amiens'a Grupo, kaj unu el la plej entuziasmaj propagandistoj de nia afero.

Oni kreis grupon en Pont-Andemer.

**Germanujo.**—Okaze Dresden'a Kongreso, ĉe kiu fakon estis dediĉata al Esperanto oni publikigis revuon titolita: «Fest=Zeitung—des II. Deutschen Esperanto—Kongresses», kies sola numero estas agrablega kaj kun vera amo sin okupas pri Esperanto, klarigante detale ĝian historion kaj nunan staton.

Bone funkciadas, Societo nomita «Internacia Koresponda Societo» kiu celas faciligi internacian korespondadon per Esperanto. La jara kotizajo estas 1 fr. 25 kaj la membroj ricevas ĉiumonate nomaron de la aliĝintoj. Sin turnu al S.<sup>ro</sup> Paul Hellriegel en Stuttgart.

S.<sup>ro</sup> Otto Getoke, Eleonoren-Strasse, 7, Wiesbaden, intencas eldoni «Esperantan Kantaron» kaj petas de la esperantisto el ĉie, sendu al li, kiel eble plej da esperantaj kantoj, pli aŭ malpli facile kanteblaj; tekstoj kaj notoj.

S.<sup>ro</sup> Ch. Zacherl, Eggendobl 4 Passan,

vulgar el uso del Esperanto entre los marinos.—2.<sup>o</sup> Iniciar ó ayudar cualquier organizaci6n cuyo fin sea proporcionar á los navegantes, en los puertos, los beneficios procedentes del uso del Esperanto.

Para informes referentes á este asunto, convenientísimo á los marinos y viajeros por mar, diríjense al Sr. René Mesny, profesor de navegaci6n, Granville (Mancha).

Nuestro querido amigo el teniente Bayol y su señoira hicieron una expedici6n por diferentes poblaciones alemanas y bohemas, habiendo sido en todas partes fraternalmente recibidos por los samideanos. Durante su viaje trabajaron con provecho por nuestro querido idioma y por su fraternidad con la Cruz Roja.

«Les Annales Diplomatiques & Consulaires» publica una serie de artículos calurosos referentes al Esperanto, del Sr. Tassencourt, presidente del Grupo de Amiens y uno de los más entusiastas propagandistas de nuestra causa.

Se ha creado un grupo en Pont-Andemer.

**Alemania.**—Con ocasi6n del Congreso de Dresde, en el cual fué dedicada una secci6n al Esperanto, se ha publicado una revista titulada «Fest=Zeitung—des II. Deutschen Esperanto Kongresses», cuyo único número es agradabilísimo, y con verdadero cariño se ocupa del Esperanto, explicando detalladamente su historia y actual estado.

Bien funciona la Sociedad llamada «Internacia Koresponda Societo», que se propone facilitar la correspondencia internacional por medio del Esperanto. La cuota anual es de 1 fr. 25 y los miembros reciben mensualmente una relaci6n nominal de los adheridos. Diríjense al señoir Paul Hellriegel en Stuttgart.

El Sr. Otto Gehoke, Eleonoren Strase, 7, Wiesbaden, se propone editar una colecci6n de cantos en Esperanto, y pide á los esperantistas de todas partes que le envíen cuantos más posibles cantos en Esperanto más ó menos fáciles de cantar; textos y notas.

El Sr. Ch. Zacherl, Eggendobl, 4,



klarigi tion, kion oni devas diri, sed koleri! neniel.  
D.<sup>a</sup> IRENE scias kiom mi estimas ŝin.

D.<sup>a</sup> IRE.—Jes, sinjoro, mi tion scias, kaj mi estas tre dankema pro la favoroj, kiujn vi faris al ni... kaj precipe por tio...

D. DIE.—Neniu parolu pri danko; ĉio tio kion mi povas fari estas malmulta... Mi nur deziras ke D.<sup>a</sup> Francinjo estu kontenta.

D.<sup>a</sup> IRE.—Nu, ĉu ŝi ne tia estas? Respondu.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Jes, sinjoro, mi estas kontenta.

D. DIE.—Kaj ke la ŝanĝo de stato kiu alproksimiĝas ne kaŭzu al ŝi la plej malgrandan bedaŭron.

D.<sup>a</sup> IRE.—Ne, sinjoro; tute kontraŭe. Edziĝo pli ŝatinda al ĉiuj ne estas imagebla.

D. DIE.—Sub tiu supozo mi povas certigi vin ke ŝi neniam havos kaŭzon penti. En nia hejmo ŝi vivos amata kaj adorata; kaj mi esperas ke per bonaĵoj mi meritos ŝian estimon kaj amikecon.

D.<sup>a</sup> FRAN. Mi dankas vin, sinjoro D. Diego... Al orfulino malriĉa, senhelpa kiel mi!...

D. DIE.—Sed de ecoj tiel estimindaj, ke iĝi ŝin indigas je pli granda riĉeco.

D.<sup>a</sup> IRE.—Venu tien ĉi, venu... Venu tien ĉi, filino mia!

D. FRAN.—Patrineto! (*D.<sup>a</sup> Francisca leviĝas, ĉiukaŭprenas sian patrinon, kaj ili sin karesas reciproke.*)

D.<sup>a</sup> IRE.—Cu vi vidas kiom mi amas vin?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Jes, sinjorino.

D.<sup>a</sup> IRE.—Kaj kiom mi serĉas vian feliĉecon; ĉar mia sola celo estas vidi vin loĝigita antaŭ ol mi mortu.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Mi bone scias tion.

D.<sup>a</sup> IRE.—Karulino mia! Ĉu vi estos bona?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Jes, sinjorino.

D.<sup>a</sup> IRE.—Ho! vi ne scias kiom vin amas via patrino.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Sed, ĉu mi do ne amas vin?

D. DIE.—Ni foriru, ni foriru de tie ĉi. (*Leviĝas D. Diego, kaj poste D.<sup>a</sup> Irene.*) Iu povas alveni kaj trovi nin tri plorantajn kiel tri infanoj.

D.<sup>a</sup> IRE.—Jes; vi parolas prave. (*Ili du iras en la ĉambregon de D.<sup>a</sup> Irene. D.<sup>a</sup> Francisca iras poste; kaj Rita, kiu eniras tra la centra pordo, ŝin haltigas.*)

## SCENO VI

**Rita, D.<sup>a</sup> Francisca.**

RITA.—Fraŭlino... He! Silenton! Fraŭlino...

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kion vi volas?

RITA.—Li venis.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kiel?

RITA.—Li ĵus alvenis. Mi donis al li kareson,—

petante al vi pardonon—kaj nun li supreniras la ŝtuparon.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ho, Dio!... Kion mi devas fari?

RITA.—Belega demando! Nun estas plej grave ne perdi tempon per amindumaj sensencaĵoj... Al la afero... kaj prudente. Kaj memoru ke en la loko, kie ni trovas nin la interparolado ne povas esti tre longa... Jen li estas.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Jes; estas li.

RITA.—Mi foriras vigli tiujn personojn... Kuraĝon, fraŭ ino, kaj decidecon. (*Ŝi eniras la ĉambron de D.<sup>a</sup> Irene.*)

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ne, ne, ĉar mi ankaŭ... Sed ne konvenas...

## SCENO VII

**D. Carlos** (*eniras tra la centra pordo*),  
**D.<sup>a</sup> Francisca.**

D. CAR.—Francinjo!... Ĉarmulino mia!... Jen mi estas. Kiel vi fartas, belulino? kiel?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Bonvenon al vi.

D. CAR.—Kial tiel malĝoja? Ĉu ne meritas mia alveno pli da ĝojoj?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Estas vere. Sed ĵus okazis al mi aferoj kiuj frenezigas min. Ĉu vi scias?... Jes, vi ja scias. Post kiam mi skribis tiun leteron, oni veni-

gis min... Morgaŭ Madridon... Tie estas mia patrino.

D. CAR.—Kie?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Tie, en tiu ĉambro. (*Montrante la ĉambro de D.<sup>a</sup> Irene.*)

D. CAR.—Sola?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ne, sinjoro.

D. CAR.—Ĉu kun la fianĉo edzigota? (*Li alproksimiĝas al la ĉambro de D.<sup>a</sup> Irene, haltas kaj revenas.*) Plibone... Sed, ĉu ne estas alia kun ŝi?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Neniu plu... Kion vi pensas fari?

D. CAR.—Se mi forlasus min al mia pasio kaj al tio kion inspiras al mi tiuj okuloj, bravegaĵon... Sed tempo restas... Li an'ĉaŭ povas esti homo de honoro, kaj ne estas juste insulti lin, tial ke li amas virinon tiel indan je amo. Mi ne konas vian patrinon... ho! nun nenio estas farebla... Via famo postulas la unuan prizorgon.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Estas granda ŝia obstino ke mi edziniĝu kun li.

D. CAR.—Tio ne malhelpas.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ŝi volas ke tiu ĉi edziĝo efektiviĝu tuj kiam ni alvenos Madridon.

D. CAR.—Kia? Ne, neniam.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ambaŭ interkonsentis kaj diras...

D. CAR.—Bone... Ili diros... Sed ne estas eble...

D.<sup>a</sup> FRAN.—Mia patrino senĉese parolas al mi nur pri tio. Ŝi minacas min; ŝi plenigis min je timo... Li ankaŭ urĝas min, promesas al mi tiom da bonaĵoj, mi...

D. CAR.—Kaj vi, kian esperon donas vi al li? Ĉu vi promesis ami lin multe?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Sendankemulo!... Ĉu vi ne scias ke?... Sendankemulo!

D. CAR.—Jes, jes, mi scias, Francinjo... Mi estas via unua amo.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kaj mia lasta.

D. CAR.—Kaj mi perdos la vivon antaŭ ol forlasi la lokon kiun mi havas en tiu koro... Ĝi estas tute mia... Ĉu ne?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kies do povas ĝi esti?

D. CAR.—Ĉarmulino! Kia dolĉa espero vivigas min!... Unu sola vorto el tiu buŝo certigas min... Ĝi kuraĝigas min por ĉio... Resume, jen mi estas. Ĉu vi venigis min por ke mi defendu vin, liberigu vin, plenumu devon mil kaj mil foje promesitan? Nu, ĝuste pro tio mi venis. Se vi morgaŭ iros Madridon, mi ankaŭ tien iros. Via patrino scios kiu mi estas. Tie mi povas kalkuli kun la favoro de ia maljunulo bonega kaj estimata, kiun, pli bone ol onklo, mi devas nomi amiko kaj patro. Li ne havas parencon pli proksiman aŭ pli amatan ol mi; li estas riĉa, kaj se la bonaĵoj de riĉeco havas por vi allogon ian, tiu ĉi cirkonstanco aldonos feliĉaĵojn al nia unuiĝo.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kaj kian valoron havas por mi la tutaj riĉaĵoj de la mondo?

D. CAR.—Mi ja scias. Ambicio ne povas agiti spiriton tiel puran.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ami kaj esti amata... Nek deziras mi pli, nek konas mi pli grandan feliĉon.

D. CAR.—Ne ekzistas alia... Sed vi devas trankviliĝi kaj atendi ĝis kiam la ŝanco ŝanĝos nian nunan bedaŭron por daŭra feliĉeco.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Sed, kiel ni agos por ke mia bona patrino ne ricevu malĝojon?... Ŝi amas min tiom!... Mi ĵus diris al ŝi ke mi ne malĝojigos ŝin, ke neniam mi forlasos ŝin, ke ĉiam mi estos obeema kaj bona .. Kaj ŝi karesis min tiel kortuŝita! Ŝi restis tiel konsolita pro la malmulto kiun mi sukcesis eldiri... Mi ne scias, mi ne scias, kian vojon vi trovos por ke ni ne enfalu en tiujn ĉi danĝerojn.

D. CAR.—Mi ĝin serĉos... Ĉu vi ne konfidus je mi?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Nepre, mi konfidas. Ĉu vi kredas ke mi estus viva se tiu espero ne vivigus min? Sola kaj nekonata de ĉiuj, kion mi povus fari? Se vi ne estus veninta, mia melankolio estus mortiginta min, ĉar mi ne havas iun al kiu mi turnus min, nek al kiu mi povus komuniki ĝian kaŭzon. Sed vi kondukis kiel nobelo kaj amanto, kaj per via alveno vi ĵus donis al mi la plej bonan pruvon de via granda amo. (*Kortuŝita ŝi ekploras.*)

D. CAR.—Kia ploro!... Kiel ĝi konvinkas!... jes, Francinjo, mi sola sufiĉas por defendi vin kontraŭ

ĉiuj kiu subpremos vin. Kiu kuraĝos kontraŭstari amanton akceptitan? Nenion timu.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ĉu vere?

D. CAR.—Nenion... La amo unuigis niajn korojn per fortaj ligiloj, kaj nur la morto povas ilin diskunigi.

## SCENO VIII

**Rita, D. Carlos, D.<sup>a</sup> Francisca.**

RITA.—Fraŭlino, eniru, eniru. Via patrino demandas pri vi. Mi iras alporti la vespermanĝon kaj poste ili tuj kuŝiĝos. Kaj vi, sinjoro amindumanto, vi povas disponi je vi mem.

D. CAR.—Jes; ne konvenas vekti suspekton. Mi ne bezonas diri plu.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Nek mi ankaŭ.

D. CAR.—Ĝis morgaŭ, per la taglumo ni vidos tiun ĉi faman konkuranton.

RITA.—Sinjoron tre respektindan, tre riĉan, tre prudentan, kiu portas longan jakon kaj blankan ĉemizon, kaj li havas sesdek tutajn jarojn sub sia peruko. (*Ŝi foriras tra la centra pordo.*)

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ĝis morgaŭ.

D. CAR.—Adiaŭ, Francinjo.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Iru kuŝiĝi kaj ripozi.

D. CAR.—Ripozi kun ĵaluzo!

D.<sup>a</sup> FRAN.—Pri kiu?

D. CAR.—Bonan nokton. Dormu bone, Francinjo.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Dormi kun amo!

D. CAR.—Adiaŭ, ĉarmulino.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Adiaŭ (*Ŝi eniras la ĉambron de D.<sup>a</sup> Inés.*)

## SCENO IX

**D. Carlos** (*promenante maltrankvile*), **Kalamoĉo**.

D. CAR.—Forpreni ŝin de mi?... Ne, li estu kiu ajn, li ne forprenos ŝin de mi .. Nek estos ŝia patrino tiel malsaĝa, tiel obstina pro tiu edziĝo, kiam ŝi ekscios ke ŝia filino malamas ĝin... kaj ke mi min intermetas... Sesdek jaroj!... Ĝuste li devas esti tre riĉa... La mono!... Malbenita estu ĝi, kiu kreas tiom da malpaco!

KAL. (*enirante tra la centra pordo.*)—Nu, sinjoro, ni havas duonon da kaprido rostita kaj... almenaŭ ĝi ŝajnas kaprido... Ni havas belegan salaton de kresoj sen miksaĵo ia de malbonaj herboj, bone lavitan, sekigitan kaj pretigitan per tiuj ĉi pekaj manoj miaj, tiel ke ne estas eble havi ion pli bongustan. Blankan panon, kaj trijaran vinon... sekve, se ni devas manĝi kaj dormi, mi opinias, ke...

D. CAR.—Bone. Kie ni manĝos?



Bavarujo, klopodas pri fondo de «Inter-racia fako Esperantista» por bestprotektado. La bestamantoj petu al li pli da informoj.

**Hindujo.**—Grupon estas fondita en Agra.

**Italujo.**—Ni kalkulas tie geesperantis-tojn tiel gravajn kiel liajn moŝtojn gesinjorojn principon Malfatti, grafinojn Castelbarco, Visconti, Trivulzio... grafon Gritti Morlachi. . k. t. p. Plaĉegas al ni ke la nobelaro, daŭrigante sian meritan historion, ŝirmu ĉian humanan kaj taŭgan aferon kaj ni vidus plezurege ke en Hispanujo kaj ĉie, tiu respektinda socia klaso imitu siajn Italiajn samulojn.

Tie, ankaŭ aliĝis al ni la notinda kaj tre konita predikisto Pastro Semeria.

La Udine'a gazeto «Il Crociato» publikigis esperantan kurson de la sindona esperantisto Pastro Bianchini.

**Kanado.**—La progresado tie, estas granda kaj oni projektas la fondon de esperantista gazeto kiu eliros en Torento.

**Meksikujo.**—«El Testigo» daŭrigas siajn bonajn propagandajn artikolojn pri Esperante. Ankaŭ «El Esforzador Mejicano», ambaŭ el Guadalajara'o, helpas nian kaŭzon per publikigado de esperantaj lecionoj, kaj «El Abogado Cristiano» el Meksiko, same dediĉas laŭdajn frazojn al nia triumfanta lingvo.

**Svisujo.**—Grupoj fondiĝis en Grizonujo, Beguins, Iverdon, Baden, Morgés, Trogen kaj Zurich.

La «Svisa Esperanta Societo» decidis doni Atestojn pri lernado kaj Superajn Diplomojn. Por tio oni kreis Ekzamenan Komitaton.

Gazeto «Esperanto» malfermis duan serion de sia «Enketo-konkurso». Oni respondu la jenajn demandojn pri la lando kie loĝas la leganto: *Kosto de la loĝado.*—*Kosto de la vestado kaj meblaro.*—*Kosto de la instruado.*—*Kosto de la*

Passan, Bavarujo, trabaja para fundar una «Sección Internacional Esperantista de protección de animales». Los afectos á esta idea, pídasle más informes.

**India.**—Se ha fundado un grupo en Agra.

